ESPERANTO

MONATA GAZETO DE E-HANDIKAPULOJ

INFORMILO

6

JUNIO 2020 Kol. 422/36

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

Enhavo: Desegnita kafejo; Utilo de tabako; Dvůr Králové; SES + plusoj

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

Desegnita kafejo



En la centro de la urbo Peterburgo estis malfermita kafejo kun nekutima stilo de la internaĵo, kiu al la vizitantoj elvokas optikajn iluziojn.

Sur la kajo de la rivero Mojka ĝi kaptas atenton jam per sia nigra-blanka ŝildo kun la titolo **Nigrablanka kafejo**. Post eniro la ŝatantojn de kafo kaj de fenomenaj travivaĵoj atendas blanka interno kun nekutime frapanta desegnaĵo de nigraj linioj, kiuj optike faras formojn pli grandajn, ol ili fakte estas. Tiun spritan dezajnon elkreis la loka pentroartistino

kaj grafikistino Anfisa Tošinova. Ĉefe junulojn allogas la eblo foti sin tie ĉe kafo por Instagramo.

La urbo Peterburgo estas la plej alloga rusa urbo, ĝi logas pro sia arkitekturo kaj pro la neripetebla „genius loci“ – genio de la loko. Prave ĝi havas la kromnomon „kultura metropolo de Rusio“. De gazeto Květy tradukis E. Pazourková

UTILO DE TABAKO

Usona fabriketo eksperimentas per gripvirusa infektado de tabakplantoj: ĉar rezultas milda formo de la viruso, eblas ekstrakti kontraŭgripan vakcinon. Kompare kun la nuna metodo per kokinaj ovoj (necesas po tri por utiligebla dozo) la tabakplanta kultivado de vakcinoj gajnas multan tempon: kokinovoj nur post du semajnoj produktas la vakcinon, dum tabakplantoj kreskas tre rapide. Dum jaro la 12 plej grandaj farmaciejoj en la mondo povos produkti sufiĉe por tri miliardoj da dozoj, dum la teksasa fabriketo sola povos produkti duonon de tiom. Kompreneble, se la eksperimento sukcesos.

Sponsoras tion i.a. la usona armeo, kaj 60 milionoj da dolaroj donas al Green Vax taŭgan startigan kapitalon. Do la postmeksika gripepidemio ne plu timigu la homaron. “Kaj profitos ankaŭ la kokinoj”, oni asertas.
Restu senkorona! (ĉu senkrona, ne gravas!)

Rob Moerbeek

Dvůr Králové nad Labem (*Korto de la reĝino)*

estas urbo en orienta Bohemio. Ekskurson en ĝi kaj la ĉirkaŭaĵo vi povas komenci sur la urba ĉefplaco, fama pro tio, ke ĉi tie en la turo la ĉeĥa verkisto Václav Hanka en la jaro 1817 onidire trovis tiel nomatan „Manuskripton de Dvůr Králové“ (onidire la plej malnovan ĉeĥe skribitan tekston, enhavantan poemojn kaj kantojn).

Pri tiu ĉi manuskripto, pri kies nepraveco oni konfliktas jam du jarcentojn, plimulto da vizitantoj preskaŭ nenion scias, dum – la safari parko, en kiu vivas pli ol 2300 afrikaj bestoj, (ĝi estas la plej granda siaspeca kolekto en Eŭropo) logas gastojn el ĉiuj eŭropaj landoj. Ĉi tie vi trovos ankaŭ dek kvin brile aranĝitajn subĉielajn ekspoziciojn, ekzemple Tropikan ŝlim-akvejon, Afrikan savanon aŭ Akvan mondon kun galerio de bildoj de Zdeněk Burian. La bestoj ĉi tie estas preskaŭ je mandistanco - en kelkaj momentoj vi povus eble eĉ karesi ilin, sed nur, se tio ne estas rigore malpermesita.

Ankaŭ la safari-parko estas ankaŭ unika en Eŭropo – la eblo enloĝiĝi en bangalo aŭ tendo, same kiel okazadas en naciaj parkoj en Afriko. Ĉe iom da feliĉo vi povas el via hangareto observi iujn belajn bestojn de la nigra kontinento kaj senti vin preskaŭ esti tie. Eĉ la nokta bestrorado ne mankas!

Dum la tagoj la parko logas per travivaĵaj programoj: Vi eble povas fariĝi bestoprizorgisto por unu tago aŭ rigardi la Zoon tra malantaŭaj pordetoj. Alia pluso estas, ke la safari-parko estas tiel granda, ke en ĝi ne povas okazi amas-premoj, kiuj ofte

detruas travivaĵojn al vizitantoj de urbaj Zooj. Fakuloj ĉi tie aprezis kolekton de pli ol 330 skeletoj de bestoj el la tuta mondo inkluzive de la rinocerino Nabiré. Al la infanoj tre plaĉas ŝnurparko kaj restoracio kun elvido al ludemaj eŭlemuroj.

Famekonatan banejon ruinigis inundo.

Dvůr Králové, kiel ankaŭ la nomo aludas, estas la arĥaika dotourbo de ĉeĥaj reĝinoj. Pro tio vi ĉi-tie tie malkovros vicon da historiaj vidindaĵoj. Iom pli kontraŭ la fluo de la rivero Elbo troviĝas valbaraĵo kun eble la plej bela digo ĉe ni - Les Království (Arbaro Reĝejo). Okaze de anticipa mendo vi povas la belecon de la regiono admiri ankaŭ el aviadilo aŭ balono. Oni rekomendas tion precipe, se vi volas vidi ankaŭ Kuks. Tie videblas krom la baroka apoteko „Ĉe Grenato“, hospico kaj preĝejo. Tie atendas vin ankaŭ famaj estradoj kun skulpto-alegorioj de virtoj kaj malvirtoj. Tiujn lastajn kreis Mateo Bernardo Braun.

La grafo Špork en la jaro 1694 komencigis la aŭdacan kaj tre multekostan projekton: konstrui en la valo de Elbo luksan banlokon por la elito de la tiama socio. Tutplene li sukcesis. Kuks jam post dekjaro efektive gastigis eminentularon de la tuta Eŭropo. Bedaŭrinde ne por longa tempo. Nelonge post la morto de Špork okazis en la banloko detrua inundo kaj la vivon en ĝi oni ne plu sukcesis revigligi.

Danke al multjaraj renovigaj laboroj ĉio, kion la naturo lasis al ni, estas ree „kiel nova", oni aranĝas ĉi tie vicon da aktivaĵoj (la plej famaj estas solenoj de sankta Huberto kaj festivalo de baroka teatro, opero kaj muziko: Theatrum Kuks).
Proksime de ĉi-tie estas natura muzeo de skulptaĵoj – Betlehem-figuraro de Braun, kiu dum centjaroj suferis pro kapricoj de la vetero, sed estas ĉiam bela.

De la gazeto Vlasta tradukis J. Hron

SES 2020 - virtuale, en Ĉeĥio nur en 2021

Kun bedaŭro ni informas vin, ke SES 2020 ne okazos ĉi-jare fizike en Ĉeĥio - kiel antaŭe planite. Sed aliflanke, kun ĝojo ni informas vin, ke ĝi tamen ja okazos - virtuale kaj tutmonde!
La pandemiaj obstakloj ne permesas, ke SES 2020 okazu kiel kutime, tial ni preparas por vi specialan, unikan virtualan Esperanto-lernejon! Unuafoje en la historio do vi havos la ŝancon lerni Esperanton dum SES kaj samtempe resti hejme! ☺
Tiu ĉi SES okazos de la 18-a ĝis 26-a de julio 2020, kaj la ĉefa instruado okazos dum la du semajnfinoj (kun aldona libervola programo inter ili - lunde - vendrede). Nuntempe ni diligente laboras pri la detaloj de ĉi-jara, pure reta SES: pri ties formo, datoj, enhavo.
Rimarko: Tiu ĉi situacio pri la kronviruso certe nin, organizantojn ne ĝojigas – tamen, aliflanke, pere de tia ĉi „virtuala SES" povos tiun ĉi nian retan Esperanto-lernejon partopreni eĉ pli da

homoj ol kutime. Ja ne necesos vojaĝi, pagi por tranoktoj/manĝoj ktp. Ni do esperas, ke al multaj el vi eblos partopreni - niaj instruistoj jam antaŭĝojas pri vi! Kaj se vi konas homojn, kiuj povus interesiĝi pri ĉi-speca virtuala SES, nepre informu ilin - la aranĝo ja povas taŭgi por diversaj personoj, kiuj pro ajna kialo (financoj, tempo-manko, distanco ktp.) ne povus/as partopreni kutiman SES-on aŭ tradiciajn Esperanto-eventojn ĝenerale. Rekomendu al ili partoprenon - aliĝi jam eblas ĉe https://ses.ikso.net/2020/eo/aligxilo/

Aliĝo ĝis 4.6.2020 por B-landanoj (inkluzive Slovakion) = nur 40 EUR. (post 4.6. = 45 EUR)

Peter Baláž –prezidanto de SKEF

Plusoj de la virtualaj Esperanto-aranĝoj

1) Krokodilado

Ĉu vi ne ŝatas, kiam oni dum EO-evento konstante krokodilas? (des pli, se vi mem ne parolas la konkretan krokodil-lingvon, kaj vi estas eble la sola aŭ preskaŭ la sola eksterlandano)

Dum virtuala aranĝo tio ne minacas (aŭ kaze ke okazos, vi povas facile "eskapi" – malŝaltante la komputilan programon aŭ almenaŭ mikrofonon de la koncerna persono).

2) Ronkado

Ĉu vi jam iam devis loĝi kun ronkemulo/j? Aŭ eĉ pli koŝmare – ĉu vi jam dormis en amasloĝejo kun pluraj tiaj? Imagu – nenio

tia nun okazos! La sola, kiu ronkos en via ĉambro dum virtuala EO-evento estos maksimume vi!

3) Manĝoj

Plendi pri manĝoj dum EO-aranĝo jam apartenas al la kultura rito de multaj ĝisostuloj. Ĉu tro/maltro da viando/terpomoj? Ĉu tro/maltro sala? Ĉu dolĉaĵo kiel ĉefplado? Brrrr! Neniaj strangaĵoj plu surtelere! Nun via manĝo estos precize tia, kian vi mem pretigos por vi!

5) Vestaĵoj

Vestaĵoj jam firme apartenas al la ĝenerala kulturo de la homaro. Tamen, ankaŭ manko de vestaĵoj estas parto de kultura diverseco de homoj, kiu tamen ne estas ofte reprezentata dum Esperantaj renkontiĝoj (almenaŭ ne publike). Sed sidante ĉe via komputilo vi povas havi tiom (aŭ neniom) da pantalonoj, kiom vi volas. Aldone –forfalas la eterna batalo „kion kunporti" en la valizo, kiajn vestaĵojn kaj kiom da ili enpaki. Nun la tuta vesto-ŝranko estas je via dispono!

6) Lacigaj vojaĝoj

Ne ĉiu ŝatas longajn horojn pasigi en diversaj trafikiloj (ĉi tie ni jes ja celas veturilojn), ŝanĝi ĉe diversaj konektoj, deĉifradi en fremdaj lingvoj la anoncojn, vane provadi aĉeti biletojn, ekscii kie ĝuste eltrajniĝi ktp. Jen, se vi apartenas al tia ĉi grupo, virtualaj aranĝoj senpezigas vin de grava malhelpilo partopreni la eventon.

9) Tempo-ŝparado

Certe veturi ien por Esperanta aranĝo, por semajnfina renkontiĝo, aŭ eĉ por la tuta semajno ne facilas por ĉiu – kaj ankaŭ ne eblas tion fari tre ofte. (Foje oni devas eĉ labori. Aŭ mankas la financoj por partopreni… Aŭ – mankas la tempo por ĉeesti!) Kun virtualaj aranĝoj estas pli facile viziti plurajn el ili eĉ dum unu semajno – kutime ili ne daŭras tro longe, kaj ja ĉiuj vizit-

eblas de via propra loĝĉambro (aŭ por eĉ pli pigraj, rekte de via lito). Plia tempo-ŝpara konsilo: ĉu vi emas aŭskulti prelegon, tamen necesas pretigi tagmanĝon aŭ vespermanĝon por via familio? (aŭ ordigi loĝejon, gladi vestaĵojn, manĝigi bestojn, purigi ŝuojn…) Dum virtuala aranĝo ja eblas! Prenu kap-aŭskultilojn, kaj jen, vi samtempe ĉeestas EO-aranĝon, samtempe utile pasigas tempon hejme. De Esperantisto Slovaka 1/2020

Atentigo

Forflugis preskaŭ duono de la jaro kaj pro la kronvirusa epidemio ne okazas nun E-renkontiĝoj, ĉe kiuj niaj anoj kutime pagas kotizojn por AEH. Se vi ankoraŭ kotizon por la jaro 2020 ne sendis kaj vi ne havas eblecon sendi ĝin pere de iu konatulo, bonvolu sendi ĝin tra la banka transprocezo. Ni antaŭdankas al vi. red.

INFORMILO – monata gazeto por esperantistoj-handikapuloj + suplemento **ANTAŬEN**
Eldonas AEH – Asocio de esperantistoj-handikapuloj en Pardubice
Redaktoroj: Jarmila Rýznarová, Ludmila Srbová, Lenka Angelová
Adreso: Svaz zdravotně postižených esperantistů, Na Okrouhlíku 953/21,
530 03 PARDUBICE, CZ tel. **466 611 941**
e-mail: aeh@esperanto-aeh.eu interreto: www.esperanto-aeh.eu
Banka kunligo: Fiobanko, kont-numero de AEH 2801322017, bank-kodo 2010
Bankovní spojení: Fio banka , číslo účtu AEH 2801322017, kód banky **2010**
IBAN: CZ3520100000002801322017 SWIFT/BIC: FIOBCZPPXXX
La jarabono de Informilo **20 €** (en kovertoj), aŭ **10 €** (e-mail)
Roční předplatné Informila **300,-Kč** (v obálkách), nebo 150,-Kč (v e-mailu)
Při platbách vždy uveďte vaše členské číslo (naleznete nad vaší adresou) jako variabilní symbol! Příspěvek svazu AEH v dobrovolné výši.
Kotizo por AEH propravola. Kodo ĉe UEA: aehk-z
redakcio ne ĉiam havas la saman opinion kiel la aŭtoroj de de artikoloj.